

## ★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.

Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komerco“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

**Eldonantaro:**  
Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norfa, komercisto, Barcelona  
H. Fischer, grandindustriisto, București  
Teo Jung, Horrem b. Köln  
Frans Schoofs, Antwerpen (Anvers)  
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

**Tarifon**  
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Administrejo:**  
(suŭca adreso)  
Esperanto Triumfonta, Horrem bei Köln, Germanl.  
**Redaktistaro:**  
Ĉefredaktisto: Teo Jung.  
Kunredaktisto: M. Butin.  
Literatura red.: Zanoni.  
**Kunlaborantoj**  
inter la Esperantistaro de la tutmondo.  
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero.  
**Tarifon**  
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b.Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa**

### Japanaj samideanoj.

Japanujo ŝajnas esti ne nur lando de leviganta suno, sed ankaŭ lando de leviganta verda stelo. En ĉiu numero de la „Revuo Orienta“ ni legas pri multnombraj propagandaj kunvenoj, prelegoj, kursoj, festoj ktp., kaj la ekzisto de ankoraŭ aliaj Esp. gazetoj en Japanujo („Verda Utopio“ k. a.) estas por ni pruvo pri la vigleco de nia movado en la lando de l' mikado.

„Progreso de l' homaro kaj servo de Esperanto.“ (D-ro S. Niŝi.)  
„Internacia kulturo kaj lingvo internacia.“ (H. Jagi, del. de UEA.)  
„Historio de Esperanta Movado.“ (J. Kaŭahara, del. de JEL.)  
Ferma saluto. (H. Kuraĉi, del. de Ligo.)  
De la 16-a ĝis la 22-a de januaro, ĉiuvespere

#### Delegitoj kaj helpantoj de la Ligo de Nagoja Esperanta Studentaro (L.N.E.S.).

En la antaŭa vico de maldekstre dekstren: Mitsuŝi, del. JEL; K. Oŝaka, del. JEL; K. R. (Konstanta Reprezentanto de Nacia Societo) de UEA; J. Kaŭahara, del. JEL; H. Jagi, del. UEA; Kito U.; M. Hori, del. JEL; Tokio U.; K. Suauki, del. JEL; Tokio U.; J. H. Iŝiguro, del. UEA, prez. de L.N.E.S.  
En la meza vico: Onno, N.; Teramoto, M.; H. Kuraĉi, T.; U. Mori, T.; Z. Kasai, N.; Maeda, N.; I. Maĉida, N.  
En la malantaŭa vico: R. Ito, N.; Takahasi, N.; Bau, T.; Ito, T.; Murase, M.; R. Sugitara, T.; Jassuda, M.; Kuhokada, N.; Sibuta, M.  
Je la muro: Dr. S. Niŝi, profesoro de Tokio Imperia Universitato, profesoro de Aĉi Medicina Kolegio.

**Signifo de la mallongigoj:**  
UEA = Universala Esp. Asocio; JEL = Japana Esp. Instituto; Kito U. = studento de Kito Imperia Universitato; Tokio U. = studento de Tokio Imperia Universitato; N. = studento de Oka Nacia Kolegio; M. = studento de Aĉi Medicina Kolegio; T. = studento de Nagoja Teknika Kolegio.



En ET ni havis jam kelkfoje okazon pritrakti la Esp. movadon en la plej potenca regno de l' Malproksima Oriento; sed hodiaŭ ni povas la unuan fojon bilde prezenti aron de plej fervoraj japanaj samideanoj. La fotografajo, laŭ kiu ni farigis la klisŝon, estis akompanata de sekvanta letero:

Nagoja, 10-an de marto 1923.

Estimataj sinjoroj!

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis viajn specimenojn de ET. Jes, ĉiam mi varbas abonojn por via ĵurnalo...  
Mi sendas al vi unu fotografajon de kunsido de L. N. E. S. (Ligo de Nagoja Esperanta Studentaro). La 14-an de januaro ni havis grandan propagandan kunsidon ĉe „Reprezentanta Domo“ de la urbo. La programo estis jena:  
Malferma saluto. (Prezidanto de la Ligo Joŝi H. Iŝiguro, del. de UEA.)  
„Partopreno en kortuŝo de l' homaro.“ (K. Oŝaka, del. de JEL, KR de UEA; interpretis K. Susuki, del. de JEL.)

po tri horoj, estis aranĝita unuagrada kurso de nia Ligo por urbanoj.  
Ni ĉiam senlace laboros por efektiviĝo de la bela sonĝo de l' homaro. Ni fondis nian Ligon por studi kaj praktiki nian lingvon kaj helpi la Esperantan movadon. Aliaflanke, ni volas korespondi kun similaj grupoj aŭ rondoj en la mondo. Ni do turnas nin al la samideanoj kun varma peto: Vi laŭ via ebleco sendu al ni:  
1. Ĉiŝpecajn librojn, gazetojn, afiŝojn, reklamilojn, novajn kaj malnovajn por nia ekspozicio projektata kaj por lernado;  
2. monon por nia Liga kaso, por aĉetado de bezonaj libroj kaj aranĝado de niaj propagandaj kunsidoj, kursoj aŭ vojaĝoj.  
Fine ni deziras diri al ĉiulandaj Esperantistoj per via ET, se iuj vizitos nin, unue ili skribu al ni pri sia vizito, kaj ni eble povos fari ilian vojaĝon agrabla kaj bonvenigos ilin.  
Nia adreso estas:  
**Ligo de Nagoja Esperanta Studentaro.**  
Prezidanto s-o Joŝi H. Iŝiguro.  
P. O. Box 46, Nagoja, Japanujo.

### Vojaĝo.

Ordinara temo, ĉu ne? Sed tamen por la skribanto, tiu vojaĝo estis lo eksterordinara — ĉiam sopirita, malofte nur konsiderita kiel ebleco. Eksterordinara ankaŭ, ĉar estis la unua marvojaĝo de la skribanto, filo de la montoj. Eksterordinara fine pro tio, ke ĝi estis ebligita nur per Esperanto, per Esperantaj geamikoj.  
Mi ne volas min tie ĉi okupi per priskribo de la veturado tra la bela Germanlando; ĝi ja estas sufiĉe konata. Ankaŭ mi ne volas revoki la impreson, kiun faris Germanujo al mi, impreson dolorigan — kvazaŭ homego kuŝanta en katenoj, pikata, turmentata, sin kurbiganta sub la sekvoj de iuj malsano, kiun oni ĝenerale nomas „paco“.

Tamen mi deziras diri, kio kaŭzis al mi la plej premigan impreson dum mia landvojaĝo. Estis la erikejo post Berlino. Sen montoj — eĉ montoj mankas — nenio krom tero ebena kun akvo-lagetoj, sen vilaĝoj videblaj, sen io; simila al iu ajn loko en la hungara „pusto“, aŭ al la ebenajo en Polujo, malgaja, eble pli malgaja ankoraŭ, ĉar estis pluv-neĝa tago.

Hamburg, kiel mi sopiris vidi ĝin, kaj jen ĝi montriĝis al mi en pluvego, en nokto, kun multaj lumoj, kun multe da fumo el la ĉielenmontrantaj kameniubegoj.

Kvankam la venontaj tagoj estis pluvaj ankoraŭ, mi lernis ŝati la belan antikvan urbon. Venis pensoj al mi pri la antikvaj tagoj de la „Hansa“ (komerca unuigo potenca en la mezepoko), pri ĉio, kion mi aŭdis pri tiu impona komercloko.

Nature mi vizitis la naskiĝdomon de nia Brahms, la malnovajn historiajn preĝejojn, la partojn de la Elbe, la kanalojn kaj la diversajn havenojn.

Kiom da famajoj, da rememorigpunktoj! Jen la Elbtune'o, kiu kunligas la du bordojn de la Elbe-haveno per du grandaj tuboj sub la akvo. Estas siranga sento, marŝi aŭ veturi per aŭtobuso profunde sub la plej granda haveno kontinenta, dum supre veturas la marŝipegoj kun siaj pezaj ŝarĝoj.

La tunelo mem jam estas monumento por la konstruintoj de ĝi. Tie la loko, kie oni konstruis la plej grandajn ŝipojn de la mondo, kiuj nun veturas en fremdaj servoj! Ankoraŭ estas la doko videbla, en kiu nun kuŝas alia, nefinita ŝipo, kvazaŭ por montri, kiel malgranda ĝi estas kompare al tiuj kolosoj antaŭe tie faritaj.

Jen la plej granda, plej kapabla levilo de la mondo, — jen la plej granda kafmagazeno de l' kontinento, jen la plej granda — ho, ĉio estas la plej granda, plej impona.

Fine mi sukcesas ankaŭ vidi la ŝipon, kiu min portos al fremda tero, al lando ne konata, belega en mia imago, — al la lando esperata.

Ankoraŭ oni laboregas sur la ŝipo, ne ŝajnas kredeble, ke post kelkaj tagoj ĝi povos esti preta por transporti centojn da homoj, multon da ŝarĝo trans la senfinan oceanon.

Jam matene je la deka estis la enŝipiĝo, kaj mi dividis la tempon inter rigardado de la ŝipo, kajuto, konatiĝo de la tri kajutokunuloj kaj la — senpacienco.

Fine, en malfrua posttagmezo, unu el tiuj ĉiam pretaj nigraj vaporsipetoj alproksimiĝis al la nia, kiu estis kvazaŭ grandegulo kompare al ĝi. Lerte oni fiksis ŝnuregojn, kaj ĝi komencis movi nian ankoraŭ senhelpan mortaspektan koloson. Sed jam bruŝis kaj bolis en ĝia ventro kaj oni sentis preskaŭ la tremadon de la ŝipintesto, atendantaj la momenton, en kiu ili devos el propra forto antaŭenpuŝi la ŝipon.

Reciproka salutado kaj signofarado inter la ŝipanoj kaj la konatuloj restantaj sur la bordo. Baldaŭ sin forŝtelis la tiranta ŝipo, kiel sklavo, kiu ne amas, sed timas sian mastron kaj, malrapide ankoraŭ, la ŝipo el propra forto daŭrigis la veturadon valen laŭ la Elbe. La vetera dio, ĝis nun malfavora al ni, permesis nin vidi, orumitaj de la kuŝiganta suno, la lastajn montojn de la hejma kontinento.

Banvilaĝoj, nun senviaj, kaj montoj sekvis unu la alian en la ĉirkaŭaĵo. Sed jam pli rapide naĝis la ŝipo, jam pli rapide proksimiĝis la nokto.

La unuan fojon sur la ŝipo nin kunvokis la sonorilo por kumuna manĝo. Nokte ni atingis la salan akvon. Tute trankvila estis la maro, kiel lago en la kontinento. Ankoraŭ ni renkontis multajn ŝipojn, sed la venontajn tagojn ni estis solecaj sur la vasta akva dezerto. Dezerto? Ne, ĉar freŝa vento movis la supraĵon de la akvo, donante al ĝi ĉiam varian aspekton. Sed ĝi postulis ankaŭ jam oferojn de kelkaj.

La tria nokto trovis nin en Plymouth, sed nur por preni pasaĝerojn, sen plua haltado ol necesa por suprenomita celo.

Nun sekvis kelkaj tagoj kaj noktoj belega. La maro trankvila kiel spegulo, la krepuskoj ravaĵ, ravaĵ por mi „landrato“, ĉar ili estas iom aliaj ol la krepuskoj sur la tero.

Mevoŝ ne ĉesis nin akompani kaj fiŝoj saltis el la akvo ĉirkaŭ ni. Nokte oni ekvidis la lum-fajrojn de la franca marbordo malklare brili al ni.

Post dutaga veturado, ĉe matena krepusko, ni atingis la unuan haltejon Santander. Ĝi ankoraŭ estis en dormo, sed la lumoj de la haveno devis iom post iom cedi al la lumo de la pli kaj pli fortiganta taglumo. Fine piloto venis por nin gvidi en la havenon.

Jen la suno orumis la pintojn de la montaro enlanda, jen ĝi faris la saman kun la rokoj, gardantaj la enirejon de la haveno.

Dekstre bela hotelo, grandaj konstruaĵoj kaj la reĝa kastelo salutas nin.

### MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu Interakto. Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K. (3-a Daŭrigo.)

**Patrino (kun teruro, starante ĉe li).** Ankoraŭ unu horo! — Kompatema ĉielo, kion fari? (Ŝi rigardas ĉirkaŭe en granda malespero.) Ankoraŭ unu horo, kaj je la sesa mi — (kovras siajn okulojn per la manoj). Ho, tio ja estas nebla — nebla! (Falas surgenue.) Helpu, kompatu, granda Dio! (Ŝi ekstaras, rigardas Alberton dum momento, poste ŝin kaptas subita ekpenso; mallaŭte.) Jam tiel maljuna — sen familio — kaj li volus doni sian vivon por savi lin, se tio estus ebla — — (Ŝi ŝteliras al la ŝranko, elprenas du tasojn, enverŝas en unu kelkajn gutojn da fluidaĵo el malgranda kuracil-botelo; poste — hezitante momenton — ŝi enverŝas ankaŭ tiajn gutojn en la alian tason, rapide formetas la botelon, metas la tasojn sur la ŝrankon kaj sidiĝas rigardante al Johano por certigi, ke li nenion rimarkis de tio, kion ŝi faris. Johano tamen jam rimarkis ĉion, sed sidas refoje kun fermitaj okuloj kaj ŝajnigas dormi.)

**Alberto (post momento, sekigante larmojn).** Jes, patrino, ankoraŭ unu horon mi povas esti ĉe vi. Kio estas por preparoli?

**Patrino.** Mi ne scias.

**Alberto.** Ne pri mi. Pri mi ĉio baldaŭ finiĝos, sed pri vi kaj Johano.

**Patrino (ekstaras, prenas per tremanta mano la laktujojn de la breto, verŝas lakton en la du tasojn kaj metas ilin sur la tablon).**

**Alberto (rifuzas geste).** Mi ne soifas, patrino. Kial mi soifas?

**Patrino.** Trinku tamen!

**Alberto (malplenigas tason, rigardas en la malplenigitan tason kaj remetas ĝin sur la tablon).** Kio estas la sorto de vi kaj Johano, kiam mi estos — —?

**Patrino (trinkas ankaŭ; ŝiaj manoj tremas).** Dio ja zorgos por ni. (Paŭzeto.)

**Alberto. Eble Li zorgos. (Post momento.)** Ĉu tiu lakto estis malfrua, patrino?

**Patrino.** Jes, jam malfrua.

**Alberto.** Ĝi acidiĝis.

**Patrino.** Jes.

**Alberto (post momento).** Se la patro vivus ankoraŭ!

**Patrino.** Jes.

**Alberto.** — — Ĉi tiu lasta akcidento ne okazus.

**Patrino.** Vi tamen devus foriri kun la armeo.

**Alberto.** Jes; sed li povus zorgi pri vi kaj pri Johano; tiuokaze mi ne estus forkurinta. Sed mi forkuris, nur pro vi kaj pro Johano.

**Patrino.** Jes, mia knabo, tion mi scias; nur pro ni. Unu katastrofo kaŭzis la alian.

**Alberto (rigardante al la fajroloko).** O! Estas varme en la ĉambro; miaj vestoj baldaŭ sekiĝos.

**Patrino.** Jes, tre varme estas.

**Alberto.** Mi tamen ne sentis tion, kiam mi venis.

**Patrino.** Eble pro la vetero.

**Alberto.** Ne: ĉar post fulmotondro ĉiam plifreŝiĝas. Sed estas nun terure varme tie ĉi, tro varme. Mia kapo turniĝas.

**Patrino.** Eb'e pro nervemo.

**Alberto (post momento).** Kiel peza fariĝas mia kapo! (Volos ekstari, sed refalas sur la seĝon.) Kiu horo estas? Mi ne povas distingti.

Estas tro mallume — kaj la horloĝovetro estas tute nebulkovrita — — Ankoraŭ unu horo! (Li ripozigas la kapon sur la tablo.)

**Patrino (duondorme).** Dio, pardonu al mi! Mi ja estas patrino — kun du knaboj — kaj unu el ili estas tiel malfeliĉa — preskaŭ idiota —, la alia estas labori por li kaj por mi, kiam mi fariĝos tro maljuna por labori mem. — Kaj tiu serĝento estas maljuna viro, sen familio — kaj li ja volus doni sian vivon — por savi mian filon — — Ho Dio, pardonu al mi mian kulpon!

Konsideru, ke mi agis tiel pro malespero! Konsideru, ke mi estas patrino — kaj tiel malfeliĉa! Ho, mia kapo! Kiel ĉio mallumiĝas — kaj la imperiestro ne indulgus — — (Ŝi ankaŭ metas la brakojn sur la tablon kaj ripozigas la kapon sur ili. Malgranda paŭzo.)

**Johano (kiu rigardis kun streĉita atento jam kelkan tempon siajn patrinon kaj fratron, rekte ekvidas tre malrapide kaj flustras.)** Ili dormas. Mi ne dormis. (Li levigas kaj ŝteliras al la tablo, rigardas atente la dormantojn.) Jes, ili dormas. (Levas la fingron.) Mi scias, kial ili dormas. (Pripensas momenton.) Mi scias. Kiam mia kapo doloris, patrino ankaŭ en mian lakton enverŝis el tiu botelo. (Fingre montras la ŝrankon.)

Kaj kiam mia kapo ne doloris plu, tiam mi sonĝis (Levas la fingron) pri la futuro kaj pri la ŝtonoj — kaj mi svingiĝis — svingiĝis —, mi memoras, tio estis terura! Ili dormas kaj sonĝas —, mi ne dormis, mi aŭskultis. Ili volas mortpafi lin. (Levas la fingron kaj pripensas, poste li ŝteliras al la vestoj de Alberto kaj palpas ilin.) Ili sekiĝis. (Li prenas la ĉapon kaj surmetas ĝin,

iras al la spegulo.) Nun mi similas mian fratron. Nun neniu vidas miajn blankajn harojn. (Li iras al la fajroloko, demetas siajn vestojn kaj surmetas unu post la alia tiujn de Alberto; poste li serĉas en la poŝoj de la soldata mantelo kaj elprenas la pasporton soldatan, kiun li malfermas; li ridetas kaj foliumas ĝin; poste li legas flustre:)

„Alberto Dupuis, naskiĝis la duan de januaro mil-sepcent-naŭdekdua.“ (Al si mem.) Tiam mi ankaŭ naskiĝis — la duan de januaro mil-sepcent-naŭdekdua. (Legas plue.) „Nazo — rekta; mentono — ronda; okuloj — brunaj; frunto — alta; haroj — nigraj.“ (Parolante.) Jes, haroj — nigraj, kaj la miaj estas blankaj, por teruro. (Li enpoŝigas la pasporton kaj butonumas la mantelon, ekstaras antaŭ la spegulo.) Nun neniu vidas miajn blankajn harojn. Nun mi estas Alberto, la soldato, kiu estos mortpafata je la sesa horo. Jes, mi memoras. (Li rigardas la horloĝon.) Estas la dek-unua kaj duono. (Li pripensas momenton; poste li ŝteliras al la biblio, malfermas ĝin ĉe la lana fadeno, reiras mallaŭte al sia benko kaj legas flustre kaj ridetante:

„Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disĉiploj venis al li.

Kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar illa estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar illi estos konsolataj.

Feliĉaj estas la mildaj, ĉar illi heredos la teron.

Feliĉaj estas tiuj, kiaj malsatas kaj soifas justecon, ĉar illi satigos.

# ★ Bonan sukceson al la kongresoj okazantaj dum Pentekosto! ★

Mi vizitis la teron, sed — ho strange! — ĝi ŝajnis ŝanceliĝi kiel ŝipo. Kun riĉa provizo de fruktoj mi, kun mia meksika amikino, revenis al bordo, ne forgesinte, antaŭe fotografi nian belan ŝipon. Ĉirkaŭ la ŝipo establiĝis „angulborso“ — oni komercis „en markoj“ kaj mirige estis, kiel rapide la marko gajnis je valoro. Komence de la borso malvide oni rigardis la grandnombrajn biletojn, sed baldaŭ oni ofertis laŭvice 1, 1½ kaj 2 pesetojn por mil markoj, kaj kelkaj, kiuj vendis kontraŭ fruktoj, ricevis por lomo da mono amason da orangoj. Eble la savado de la germana marko venos el Santander?

Posttagmeze ni forlasis, kune kun alia franca, tre granda vaporŝipo la havenon por atingi matene la duan haltejon Coruna.

Tage la beleco de la hispana marbordo, nokte la suda ĉielo, la lumfajroj kaptis niajn sentojn. Ankaŭ nia franca kunulo prezentis al ni, nature ni same al li, belegan spektaklon. Naĝanta lum-amaso sur maro estas io nepriskribbla.

Kvankam Coruna ne estas tiel bela kiel Santander, ĝi tamen plaĉas al mi. Tie ni ne ankris ĉe la bordo, sed meze en la baseno, kaj tuj post alveno ni estis ĉirkaŭitaj de amasoj da frukt-vendistoj en etaj boatoj.

La venonta tago kiel la lasta, trovis nin matene antaŭ la nova stacio, tiun fojon Vigo. Estis la lasta stacio antaŭ transiri la vastan maron.

Ankoraŭ unu belega tago post Vigo, tiam ek-komencis maltrankviliĝi la maro. La ondoj fariĝis pli kaj pli grandaj, la ŝipaj ŝraŭboj eĉvenis pli kaj pli ofte el la akvo kaj tiam skuigis la ŝipon per staj furiozaj batoj kontraŭ la akvo, forkurinta de ili.

Ni alproksimiĝis al la Azoroj. Multaj jam estis marmalsanaj. Oni taksis la venton je fortoco de 7—8. Nokte eĉ fariĝis ventegeto kun fortoco 10, sed dum tago ree plitrankviliĝis la maro ĝis la antaŭa grado.

Bela aspekto por tiuj, kiuj ankoraŭ povis ĝui, estis velsipego batalanta kontraŭ la furioziga elemento. Tute proksime ĝi estis. Ni kun granda intereso sekvis ĝian kuraĝan, espereble sukcesan batalon, ĝis ĝi malaperis el nia horizonto.

Sekvis kelkaj similaj tagoj, ĝis fine fariĝis efektiva ventegeto kun fortoco 11—12. Imprese belega aspekto. Ŝnuregoj estis legataj surborde, kiel haltiloj, ĉio movebla estis forprenata, forte oni fermis ĉiun trueton. Dum kelkaj horoj ankaŭ al la kelkaj spertuloj, al la restintaj sanuloj ne estis permesite iri ferdekon. Ĝi estis preskaŭ ĉiam subakvigita. Eĉ la fenestroj plej supraj de la promenejo de la unua klaso estis atingitaj de la ondoj kaj parte rompitaj de ili.

Tuj kiam ni povis, mi iris kun kelkaj aliaj ankoraŭ sanaj al la ferdeko, por admiri tie la alternan subakvigon de la antaŭa kaj posta parto de la ŝipo. Estis teruraj diferencoj en la alteco de ambaŭ. Preskaŭ oni ne povis stari sur la dekliva planko. Ankoraŭ estis mallume, kaj ni nur vidis la ŝaŭm-kronojn de la ondegol, kiuj ludis kun nia ŝipo kiel kun pilketo. Ĉiuj partoj de la ŝipo krakis, kvazaŭ ĝemis kiel vivanta estaĵo sub la premo de la ventegeto kaj de l' ondoj.

En tiu tempo ankaŭ atingis nin senfadena helpopeto de alia ŝipo, sed ni ne sukcesis ĝin renkonti. Fine la taga lumo montris al ni, ke la vento kaj la ondoj rabis al nia ferdeka balustrado la tolgardilojn kaj difektis eĉ kelkloke la feran konstruaĵon.

Sekvis pli kaj pli trankvilaj tagoj kaj levigis pli kaj pli da pasaĝeroj de slaj kuŝejoj. Post tri tagoj la maro ree estis tiom trankvila, ke ni preskaŭ ne povis kredi, ke estas la sama maro, kiu tiel forte albatilis nin. Nun aperis ankaŭ grandaj aroj da „flugantaj“ fiŝoj, kvazaŭ arĝente brilantaj

sagetoj, brilantaj en la radioj de la suno, flugantaj super la akvo ofte pli longe ol minuto.

Golfherbo formis grandajn tapisojn sur la vasta blua akvo, moviĝantaj kun ĝi.

Jam ni vidis teron post 12-taga veturado. Insuletojn kun arbaroj kaj domoj.

Belega aspekto. La maro, ĉe ni blua, fariĝis, kiam vi alproksimiĝis la insuletojn, pli kaj pli helkolora, ĝis ĉe la bordo ĝi estis smeraldverda. Ĉe la bordo ĝi daŭrigis aŭ en blanka ŝaŭmo aŭ en flava sablo.

Ĉio tio, la miksaĵo de la koloroj de la akvo, de la blankaj domoj, de la arbaroj kaj de la flava sablo estis bildo neforgesebla, raviga, pentrinda.

Sekvantan tagon mi vizitis la „intestejon“ de la ŝipo. Mi admiris la grandajn maŝinojn, trapasis la akso-tunelojn, enrigardis la blindigantajn 18 oleo-fajrojn sub la grandaj kaldronoj, mi spertis la intensan varmegon super la kaldronoj, rampante kun mia afabla gvidisto — maŝinist-amiko de mi — sur ilin, kaj poste refreŝiĝis ĉe la glaciig-maŝino de la ŝipo. Reveninte al la taga lumo — mi bezonis funton da sapo por forligi mian ŝviton kaj ole-ŝmiraj-on.

La venonta tago alportis nin al Kuba kaj al Habana, la celo de mia vojaĝo. Post belega sunleviĝo mi baldaŭ vidis la montojn de flu tero, kiu por tempo estos mia dua patrujo. La valoj kuŝis ankoraŭ en nokta mallumo, dum la pintetoj de la montoj jam estis ĉirkaŭflutataj de la taga lumo. Rapide ni alproksimiĝis la insulon, rapide la krepusko ŝanĝis sin al tago, kiel ja konate en tropikaj landoj, kaj per helpo de teleskopoj ni ekvidis la unuajn kokospalmojn, sukerplantajojn, fervojojn kun kano ŝarĝatajn.

Je la naŭa ni vidis Habana, je la deka ni aŭngis ĝian havenon. Belege aspektas la ĉefurbo de la Respubliko Kuba, vidata de la maro. Belega estis la rompiĝo de la ondoj je la kajaj muroj, belega estis ĉio.

Enirante la havenon, ni estis atendataj de multaj boatoj kun amikoj kaj scivolemuloj: nia ŝipo ja estis la unua germana pasaĝerŝipo, kiu atingis Habana-n post la milito.

Pri miaj spertoj en kaj pri Habana, pri la afabla akcepto per la delegitoj de UEA. ktp. mi skribos alian fojon, se interesas la legantojn.

Je ĉiuj okazoj al Esperanto, pli ankoraŭ al la Esperantismo, mi dankas la belan vojaĝon, la bonan akcepton, la bonan, feliĉan estontecon.

F. P. H.

Inter London kaj Brighton, dum sesdek kvin kilometroj, kvin neesperantistoj, sed inteligentaj familiestrinoj kuradis, milde kaj komfortege, delikate kaj kviete lulante siajn kvarmonatajn bubojn, kiujn ili tiel skuis sur malmola, saltiganta vojo por gajni kvar funtosterlingojn. Eble mortos la bubetoj, sed rekordojn ili venkis!

Kaj la Esperantistoj estas frenezuloj, mi diras, mildaj, stultaj kaj senmalicaj frenezuloj.

Pretestante, ke ili faras sperton kaj superas rekordojn, homoj kuradas plurajn horojn.

Stultaj vi estas, amikoj, stultaj kaj infanaĵ.

Kaj la homoj alkuras kaj pagas cent frankojn kaj kun ĝojo rigardas virojn difektantajn unu al la alia la vizagon per pugnatobatoj. Kaj oni mullakoste pagas por vidi tiajn inteligentajn rekordulojn.

Kaj kiam oni vidas verdstelulon, oni sprite kaj inteligente ridetas. Kaj kiam mi iras en ĵurnalejon peti, ke oni bonvolu presi mallongajn artikolojn priesperantajn aŭ resumajn pri Esperantaj gravaĵoj, kiel laste pri la Venezia Konferenco, oni diras al mi, ke oni ne havas lokon por tia stultaĵo. Kaj oni komplete eklevas la ŝultrojn kaj movas la kapon: „Tiajn idiotajojn!“ ili mokas.

Frenezaj kaj stultaj, miaj amikoj, idiotaj kaj infanaĵ vi estas.

Kaj homoj dancis dum dekok horoj, kaj alia dancadis dum 24, kaj tuj alia dum 50 horoj... Kaj dum kiam, mi, stultulo, ĉi tion skribas, s-o Yimmy, samurbano mia, multe pli konata ol s-o Zamenhof, tre inteligente gimnasikadas, paŝadas, saltadas, de post hieraŭ tagmeze...

Kaj frenezaj, malsaĝaj stultaj, stultegaj, idiotaj, infanaĵ, infanegaĵ, malspirtaj, malligelitaj, spiririt-kruplaj, cerbmalsanaj ni estas, amikoj miaj.

## L. K. Cirkulero de la Prezidanto al la L. K.-anoj.

Parizo, 12. majo 1923,  
Kara kolego!

Antaŭ la 31. marto 1923 la L. K. kalkulis 75 anojn. 62 voĉdonis, sed 3 voĉdonoj alvenis tro malfrue por enkalkulo. La voĉdonoj ni ne ricevis de 11: s-oj Backheuser, (Brazilo), Behrendt, Codorniu, Furtado (Brazilo), van Melkebecke, Rohrbach, D-ro Schmidt, Sepulveda-Cuadra (Ĉilio), Török, Underhill (Usono) kaj Verax. — 59 voĉdonoj valoris.

**Pri la lingvaj demandoj.**  
52 voĉdonis por la formo: analog' (ne: analogi').  
53 " " " " konfidenc' (ne: konfidenci')  
46 " " " " nekrolog' (ne: nekrologi').

Pri la jam antaŭe aprobita formo; budĝet', pro kopieraro la vorto ne troviĝis en la starigita voĉdono, sed tamen granda plimulto esprimis favoran opinion kontraŭ nur 3, kiuj preferis buĝeto, aŭ budjeto, aŭ budjeto.

Sekve la formoj: analog', konfidenc', nekrolog', budĝet', fariĝas definitive oficialaj.

Pri la formoj, Jeŝu' (kontraŭ Jesu, kaj ark' (kontraŭ arh') 34 ilin aprobas; sed la plimulto ne ŝajnas sufiĉa por fina decido; ni do daŭrigos doni la 2 formojn en „Oficiala Radikaro“ (kaj plie: apud Jesulo) — La ĝenerala uzado decidos.

**Pri la elektoj en la L. K.**  
Laŭ unuvoĉa decido de la L. K. la

membroj elektitaj en tiu ĉi unua postmilita voĉdono estas dividotaj en 3 seriojn. Tiu, kiuj ricevis pli da voĉoj eliros en 1923, malpli da voĉoj en 1924, ankoraŭ malpli da voĉoj en 1925.

1-a serio (59—54 voĉoj): s-oj Bailey, Fuŝisava, Isbrucker (59), Aymonier, Dietterle, Inglada, Medem, Rollet de l'Isle, Stamatiadis, Leo Zamenhof (58), Witteryck (57), Belmont, Blicher, s-ino Hankel, Wackrill (56), Collinson, Couto-Fernandez, Lippmann (55), Chavet, Kenn, Sinpak (54) — Eliros en 1923.

2-a serio (55—50 voĉoj): s-oj Dreher, Furtado, Glesswein, Harvey, Sola, van Melkebecke, Verax (53), Backheuser, Butler, Edmonds (52), Boucon, Beemon y Masgraŭ, Czubiński, de Kalocsay, Migliorini (51), Bastien, s-ino Blaise, D-ro Schmidt, Wenger (50) — Eliros en 1924.

3-a serio (49—34 voĉoj): s-oj Butin, Lonkopolski, Loy, Mangada-Rosenörn, Meazzini, Padfield, Setälä (49), Mann (48), Schmid (47), Bobin, Diez, Fridri, Mojado (46), Racz, Vaona (45), Hromada, Lukkeroth (44), Piliik, Minor (43), F-ino Supichova (41), Leizerowicz (34). — Eliros en 1925.

Laŭ alia unuvoĉa decido de la L. K. la sekvantaj anoj, montriataj de l' sorto, eliros en 1929 (antaŭa 1928): s-oj Busuttil, Cart. Cornet, Mazzolini Millidge, Mybs, f-ino Shafer, Schroeder, generalo Sebert, Simon, Stojan, Villanueva.

Okaze de la elektoj en la L. K. proteston mi ricevis de s-o Hromada kaj ankaŭ kontraŭ-proteston kontraŭ la protesto de s-o Hromada. La proteston de s-o Hromado ricevis la malnovaj L. K.-anoj. Mi nur povas respondi, ke en tiu ĉi afero tute korekte kaj lojale mi agis kaj neniu akran vorton mi aldonos. Tia polemiko estas nur perdo de tempo kaj de forto. Se ilia Nacia Societo postulas de la novaĉeĥo-slovakaj L. K.-anoj, ke ili eksigu, se tion postulas ilia konscienco, ili eksigu mem, sed s-o Hromada ne rajtas ilin eksigi. La Prezidanto de la L. K. povas nur



Florado de prunoj en Kobe (Japanujo).

## Literaturo.

### Faŭst.

Efektivigis la sonĝo de multaj negermanaj literaturamantoj: Faŭst, la famekonata ĉefverko de l' mondilitraturo, la majstroverko de la germana poeto kaj giganto-ĝenulo Goethe estas tradukita en Esperanto. Nia germana samideano kaj talentita junulo Norbert Barthelmess majstre tradukis la unuan parton de l' poemo, kaj la Eldona Fako de la Sennacieca Asocio Tutmonda ĝin aperigis.

Eĉ por germanoj ne estas facile funde kompreni la verkon ne uzante unu el la multaj komentarioj, kiuj estas pli ampleksaj ol la verko mem. Barthelmess donis al ni nur la netan tradukon sen klarigoj; pro tio mi opinias necesa kaj konsilinda iom detalan skizadon aŭ klarigadon de la esenco kaj signifo de l' poemo kaj ĝia enhavo. Sinsekve mi publikigos kelkajn artikolojn, kies enhavo estos utila al tiuj, kiuj ĝis nun ne scias multon pri la verko mem; al multaj ili estu simpla kompletigo.

B. diras en la antaŭparolo al Faŭst i. a.: „Prezentante al la tutmonda Esperantistaro tradukon de tiu famekonata ĉefverko de la mondilitraturo en la internacia lingvo, mi sentas min devigata, atentigi ilin el la legantoj, kiuj ne konatiĝis ankoraŭ kun tiu drama poemo, nek kun la originalo, nek kun nacilingva traduko, pri la fakto, ke eĉ la simpla, nepre logika klareco de Esperanto, kiu certe bonege servas al esprimado de klaraj, kristalecaj pensoj kaj imagoj flozotaj, ne povas nek rajtas nuligi la mal-simoleon kaj komplikecon de la abunda formo originala. Do eĉ la Esperanta formo ne foriras al vi la vualon tie, kie ĝi estas eksakta arte-volite de la genia poeto-aŭtoro el delikataj animaj sentoj travibrantaj la brilajn versojn kune kun profundaj altpiritaj ideoj. La preskaŭ netuŝeblaj, ne-esporeblaj finproblemoj de la vivo, kiujn tamen lerte kaj sukcese kuraĝas ekui la granda interna forto de mistera poezio, esprimiĝantaj en kaŝsencaj frazoj de la originalo, restas kompreneble same nur tuŝataj, same kaŝsencaj en la traduko...“

Priiraktante la Faŭsto-temon ni unue okupu nin pri la prahistorio de la poemo.

La mezepoko, precipe la deksesara jarcento, la grand-signtifa tempo de l' evoluo, estis la lulilo de la Faŭstideo, de la figuro (persono) de Faŭst, kiu estis la temo de popolo kaj de epoko. Ni konas hodiaŭ 113 dramaĵojn verkojn pri Faŭst, 46 ekzistis jam antaŭ la tempo de Goethe. Li estis la unua, kiu artece formis kaj prilaboris la temon; do la figuro de Faŭst ne estas Goethe'a inventaĵo.

Celante kompreni la ekziston de la Faŭstmotivo, ni restadu lomete en la tempo de l' XVI-a jarcento. En ĝi ek-komenciĝis la granda ŝanĝo en nia kulturo, senteble precipe forte en la XVIII-a jarcento kaj ĝis nun ankoraŭ ne finiĝinta.

La grandan kulturperiodon de l' tempo antika<sup>\*)</sup>, portata de grekoj kaj romanoj, sekvis la periodo de ties posteuloj, germanaj triboj (gotoj, vandaloj, longobardoj, frankoj). La

\*) antika (ne antikva) = la klasika tempo de l' heleniismo.

## Marsilia vino.

(Laŭ J. S. Machar.)

Ruĝ-vino de Marsili', vi estu al ni benata!  
De l' suna montet-teren' vi fajra, sorĉa juvel'!

Ard-ruĝa kaj peza kaj de tia gusto sovaĝa,  
kvazaŭ vi estus trinkaf' el jus versita kor-sang'.

Vi versas en vejnojn la senton de forpasintaj bataloj;  
resonas en nia memor' atak-signalna trumpet'.

Ruĝ-vino de Marsili', vi estu al ni benata!  
El ĉiu via guted' eliĝas l' odor' de Rom'.

Cimbra<sup>\*)</sup> sango versigis sur la soifantaj deklivoj  
kaj kun suĉanta la ter' batalis pri ĝi la sun'.

Marjus rigardis de supre de unu tia monteto  
al terurega batal', kun ardo en la okul'.

— Marjus post mi heredos la gloron de mia persono —  
diris ĝin Scipion' post Numancia batal'.

Tiuj ĉi vortoj sonadis en la anim' de l' konsulo,  
dum da kadavroj amas' kreskis kaj kreskis sen ĉes'.

Nun, post tutaj jarcentoj, restis ĉi tie postsigno:  
ĉiu praktika vinist' amiko de l' jur' kaj ord'.

metis el blanka ostaro de Cimbro limon videblan  
inter la propra bien' kaj la najbara propraf'.

Blanke de la montetoj ĝi brilas en blua aero;  
sur tiu vina kampar' terura milit-monument'.

Vi, kiu nun vian gorgon per vin' Marsilia regalas,  
pensu pri Marjus-glor', pensu pri Rom-imperi'.

Ambaŭ jam for' ... Kaj sterkita estis la tero enfine  
por via gorgo', trinkant'. glutanta kun indiferent'

Esperantigis  
D-ro Emil Pfeffer.

\*) Cimbroj = antikva germana gento. (Rim. de l' Trad.)

## Al geedzoj.

Se sorto trompema revtukon disliras  
Per mano kruela krudfora,  
Vivvojon vi tamen felice finiros,  
Ĉar am' de geedzoj ĝismorte —  
Kvazaŭ konstante brilante la stel' —  
Gaje lumados tra sorto malhel'!

T. M., Cluj.

## Rekordoj.

Amikoj, la Esperantistoj estas frenezaj, mi diras al vi, frenezaj estas la Esperantistoj.

Vidu la aliajn homojn: kiom inteligentaj kaj superaj ili estas. Precipe superaj.

Jes, mi estis bone dirinta: la Esperantistoj estas frenezaj.

Rigardu do la aliajn homojn, mi diras. Ili estas superaj. Rekordojn ili venkas.

Kiam mi estis sesjara, kun samaĝaj amikoj miaj, mi ludis por scii, kiu kraĉus plej malproksimen, — aŭ plej alten...

George Maru, Marseille.

## Humoro.

### La Verda Kato miaŭas.

Kara ET!

Ĉu vi konsentos publikigi la ĉi-suban Gravan Komunikon (?) de la Verda Kato en viaj paĝoj?

Kun vera ĝojo la Verda Kato legis en la „Revuo“ n-o 6 de ET la bonegan versaĵon „Patrujo mia“ de samideano Enrique Legrand. Precipe plaĉis la verso „... stutoj“ saltas...“ kaj la piednoto trafe klarigas por tiuj, kiuj ne komprenis tuj.

\*) ĉevalino.

Jen grava fakto! Kiam vorto, ĝis nun tute normala, pro tro da silaboj ne taŭgas en poezio, oni povas ĝin facile anstataŭi per pli taŭga du-silaba vorto! Ni provis ĉi tiun metodon, ĝi estas rekomendinda. Juĝu mem:

### Esperantujo mia!

Sluto<sup>1)</sup> humplis<sup>2)</sup> tra la vio<sup>3)</sup>

Sekvis sladojn<sup>4)</sup> de la mero<sup>5)</sup>,

Sed ĝi blotis<sup>6)</sup>, ĉar pro flio<sup>7)</sup>

Ne daŭrigas nia nero<sup>8)</sup>...

Klarigaj piednotoj: 1) hundino, 2) lam-saltetis, 3) trarabara strato, 4) ŝuaj postsignoj, 5) estro de hamoo, 6) subite haltis, 7) manko de vortoj, 8) poezia rakonto.

Klariga subpiednoto: \*) Kelkaj domoj flanko de vilaĝo.

Kaj nun, poetoj, verku!

La Verda Kato.



